# Novjorka Prismo

Numero 108 Novembro 2001

*The Esperanto Society of New York invites you to learn about ESPERANTO, the International Language at its annual OPEN HOUSE!*

DATE: Friday, November 16, 2001, 6:30-9:00 pm

PLACE: United Federation of Teachers
260 Park Avenue South (20th/21st Streets), NYC
2nd floor (check schedule in lobby for room number)

PROGRAM: 6:30 – Refreshments

7:00 – New York esperantists will present short talks (in English) about Esperanto, its origins, and how it is used today. The program also includes a short lesson, songs in Esperanto, and a videotape about the International Language *(ankaŭ mallongan vidbendon pri la sidejo de UEA en Roterdamo)*. Everyone is welcome! ★

## Protokolo de la kunveno de la 19-a de oktobro 2001

Je 7:05 ptm, Tomaso ECCARDT oficiale malfermis la kunvenon. Ĉeestis 16 personoj, inter ili du gastoj el Londono, Anglujo, Greta BOTTINGER kaj ŝia filino, Tina. La protokolo de la 21-a de septembro estis akceptata, kun unu korektaĵo: Rochelle F. GROSSMAN diris, ke ŝi ricevis leterojn pri la katastrofo de la 11-a de septembro ne nur de nederlandanoj. Aliaj personoj parolis pri eraroj literumadaj de kelkaj vortoj en unu aŭ du el la aliaj artikoloj en *Prismo.* Pamela LIEBER diskutis iomete pri la afero ĉe UEA. Tomaso parolis pri la ebleco okazigi estraran kunvenon antaŭ la neformala kunveno je la komenco de novembro.

Tomaso ankaŭ memorigis al ĉiuj, ke la kandidatiga komitato devas fari sian funkcion antaŭ la venonta formala kunveno.





*Tina (supre) kaj Greta Bottinger, el Anglujo, dum nia oktobra kunveno.*

Rochelle volontulis prezenti la rakonton pri la muso dum la Malfermita Domo venontmonate. Nijl BLONSTEIN volontulis ludi sian gitaron ĉe la Malfermita Domo. Oni proponis, ke la kantoj estu facilaj por kanti kaj bone konataj. Nancee MEDRANO proponis, ke ni montru almenaŭ kelkajn minutojn el la filmo *Incubus*, por montri, ke Esperanto estis almenaŭ unufoje uzata en filmo. Oni proponis, ke personoj, kiuj vojaĝis kaj uzis Esperanton survojaĝe, parolu pri siaj spertoj. George BAKER volontulis paroli pri sia rapida esperantistiĝo. Nijl volontulis paroli pri la facileco lerni kaj uzi Esperanton.

Tomaso anoncis, ke la kotizo, por ĉiu persono, de la luado de la vagono por la vojaĝo al Okemo, estas $48.21. Rochelle anoncis, ke ELNA okazigas sian jarfinan vendadon de kasedoj. Nijl ricevis leteron de esperantistino en Taŝkento, kiun li gastigis. Pam disdonis librojn en Esperanto al kelkaj ĉeestantoj, kiuj esprimis intereson havi ilin. Tomaso montris hispanlingvan romanon kun la titolo *Esperanto*. Nijl kaj Pam montris librojn kun bildoj de siaj someraj spertoj en Esperantujo.



*Alex prelegas pri Vasilij Eroŝenko.*

Je 7:45 ptm, Alex KARKOVSKY komencis sian prelegon pri la bone konata blinda poeto Vasilij Eroŝenko. Li diskutis pri la libroj, kiujn Eroŝenko verkis, kaj pri la vivo kaj la amikoj de Eroŝenko. George helpis al Alex, laŭtlegante al la grupo paĝon el anglalingva artikolo. Je 8:30 ptm, Tomaso montris al la grupo partojn el vidbendo de la kunveno ĉe Okemo. Amuza parto estis la komedio de Duncan Charters pri la akĉentoj de esperantistoj el diversaj landoj. Je 8:45 ptm, Tomaso oficiale fermis la kunvenon. Tuj poste, kelkaj ĉeestantoj iris al la restoracio My Cousin Vinny's por manĝi kaj trinki. ★

*Protokolis: Stuart GREEN*

## UNA/Novjorko




La 22-an de oktobro mi ĉeestis specialan akcepton ĉe la UN Millennium Hotel; la Honora Patrono estis Nane Annan, la edzino de Kofi Annan. Ĉe la enirejo ĉiuj konatiĝis kun la du specialaj gastoj: Sir Brian Urquhart, antaŭa subĝenerala sekretario de UN pri politikaj aferoj, kaj Harry Belafonte, bonvola ambasadoro de Unicef (li jam servis dum 17 jaroj). Post malgranda festo, Kofi Annan, la ĝenerala sekretario de UN kaj William Karg, la prezidanto de UNA de Novjorko prelegis. Oni prezentis la premiojn de UN Tago (24-an de oktobro) al Urquhart kaj Belafonte, kaj ili ambaŭ prelegis bele kaj emocie pri siaj laboroj por UN kaj Unicef. ★

– *Rochelle F. GROSSMAN*

## Ni perdis la kurson denove!


La dudek trian de oktobro mi iris al Stuyvesant Adult Center por instrui la planitan elementan kurson. Kiam mi alvenis, oni diris al mi, ke ne okazos kursoj, ĉar Stuyvesant ne povis pagi sian lupagon. Bedaŭrinde, ili jam forsendis du el miaj studantoj — bonŝance ankoraŭ restis du. Do, ni decidis okazigi la klason estontece ĉe K-Mart en la Orienta Vilaĝo. Se vi havas ideon pri kie ni povus okazigi klason aŭ kiel ni povus varbi ĝin, bonvolu kunporti vian sugeston al la venonta klubkunveno. ★



– *Tom ECCARDT*

## Libro-donacoj al la bibliotekoj

Dum la somero, nia klubo donacis Esperantajn lerno-librojn al kelkaj lokaj bibliotekoj. Post decido de la estraro fari tion, mi unue telefonis al kelkaj filioj por certigi, ke ili deziras la librojn. Ili promesis surbretigi la librojn kaj ne revendi. Poste, mi biciklis al la bibliotekoj kaj transdonis la librojn. Ankaŭ Rochelle F. Grossman transdonis du kaj Leonardo Dzelzitis unu. La libroj estis *Esperanto* de David Richardson *(R)* kaj *Teach Yourself Esperanto* de Cresswell kaj Hartley *(C)*. Se vi vizitas la bibliotekojn, bonvolu kontroli, serĉante la librojn sur la breto (la kodoj estas: 499.9928 R/C).



La bibilotekoj estas: 58th Street Branch *(C)*, Bay Ridge *(C)*, Bloomingdale Regional Branch *(C) (R)*, Brooklyn Heights *(C)*, Donnell Library Center *(R)*, Jackson Heights *(C) (R)*, Jefferson Market *(C) (R)*, Kings Highway *(C)*, Kips Bay Branch *(R)*, 96th Street Branch *(R)*, Ottendorfer *(R)*, Riverside *(C)*, Roosevelt Island *(C) (R)*, kaj Tarrytown *(C)*. Restas 2 libroj por disdoni. ★

– *Tom ECCARDT*

## Sony Plaza

SONY PLAZA

La 4-an de novembro dum maratonuloj kuris, sep novjorkaj esperantistoj kunvenis ĉe Sony Plaza por babiladi. Inter aliaj aferoj, ni diskutis pri kiel varbi Esperanton en Novjorko. ★

– *Tom ECCARDT*

## Via kasistino diras . . .




## Societa kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj! Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

**Novembro** **16**

Esperanto Society of New York
OPEN HOUSE
*Friday, 6:30 pm at UFT*

Free Beginners' Esperanto Class
continues at K-Mart
*Tuesdays, 7:30-9:00 pm*
*Call 212-477-6516 for more information*

**Decembro** **2**

Tagmanĝo
*Dimanĉon, 1:00 ptm ĉe SONY Plaza*
(Limdato por kontribuajoj por *Prismo* 109)

**21**

ESNY
Zamenhofa Festo
*Friday, 6:30 pm at UFT*

United Federation of Teachers (UFT)
260 Park Avenue South, NYC
(20th/21st Streets), second floor
(check schedule in lobby for room number)

**SONY Plaza Atrium**
Madison Avenue (55th/56th Streets) NYC
Street level, in the Atrium

K-Mart – 770 Broadway at Astor Place
(Fourth Avenue & Eighth Street) NYC
K-Café, Second Floor

## Laste vizitis UEA/Novjorkon



Sabaton, la 27-an de oktobro, Dori VALLON-WHEELER (Goldendale, WA) vizitis. Estis ŝia lasta tago en Novjorko; ŝi kun sia edzo Rollie venis unu semajnon antaŭe kun grupo de emeritaj instruistoj el Kalifornio, kie Dori antaŭe loĝis kaj instruis. Ni multe diskutis pri UN kaj pri la rolo de neregistaraj organizaĵoj ĉe UN. Mi donacis multajn broŝurojn al Dori. Poste mi akompanis ŝin aŭtobuse al South Street Seaport, kie ni atendis la grupon. ★

– *Rochelle F. GROSSMAN*


ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO
c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

**Prezidanto** Thomas Eccardt (212) 477-6516
**Koresponda Sekretariino** Rochelle F. Grossman (718) 457-1490
**Protokolisto** Stuart Green (631) 751-5683
**Vicprezidanto** Thomas Leong (718) 981-4252
**Kasistino** Sofiya Soskina (718) 671-5699
**Program-Direktoro** Susan Kohn (212) 226-0443



**Novjorka Prismo**
Numero 108 – Novembro 2001
ISSN: 1059-5627
http://members.aol.com/novjorka/prismo

**Redaktoro** Jim Medrano (212) 982-5029
**Subredaktoroj** Thomas Eccardt, Nancee Medrano
**Desegnistino** Mary Pulley

Sendu kontribuajojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: jimmedrano@mac.com

© 2001 Esperanto Society of New York